

LA PONTO

Senpaga dumonata periodaĵo de la
Limburga Esperanto-Asocio (L.E.A.)
Aperas la unuan de ĉiu nepara monato.
Limdato por artikoloj : la 1-a de ĉiu para monato
Jarkolekto 3, n-ro 2 (14): julio-aŭgusto 2010
Ĉiuj antaŭaj numeroj ankoraŭ haveblas.
Helpu nin disvastigi nian revuon!
Redaktoro: Pieter Jan Doumen, Peerderbaan 81,
B-3940 Hechtel-Eksel - Tel. 011-73.20.47
Retadreso: pieter.doumen@telenet.be

Karaj Gelegantoj,

Kvankam por multaj homoj la somerferioj komenciĝas kaj ili forlasas sian hejmon por pasigi kelkan tempon en tute alia ĉirkaŭaĵo, kaj eble ne havas multan tempon aŭ emon legi, kiam la suno arde brilas, ni sendas al vi nian senpagan revuon, kiu estas redaktita tute en Esperanto, kaj kiun, ni esperas, vi ŝatas legi. Kiel ĉiam ni faris nian eblon doni al ĝi buntan enhavon.



La antaŭan numeron ni sendis al 215 esperantistoj precipe en Belgio kaj Nederlando, sed ankaŭ al kelkaj en Germanio, Rusio, Vietnamio kaj Japanio. 24 ekzemplerojn ni sendis paperpoŝte, la reston retroŝte. Kiel vi povas supozi, la redaktado de tiu ĉi revuo estas sufiĉe granda laboro, kiun mi faras kun plezuro por kontribui en mia maniero al la disvastigo de la lingvo. La sendado de la revuo kostas malmulte. Tial ni petas vin, se la revuo plaĉas al vi, sendi al ni retadresojn de amikoj-esperantistoj en via lando. Estos plezuro por ni transsendi ĝin al ili. Ankaŭ vi mem rajtas plusendi ĝin.

Ni deziras al vi multan legadplezuron!

P.J. Doumen, redaktoro

La vivo de D-ro Zamenhof (fino) *(Het leven van Dr. Zamenhof (slot))*

Li longe serĉis eldoniston por eldoni sian broŝuron, sed trovante neniun kiu pretas fari

tion, li mem eldonis ĝin kun la subteno de la patro de sia fianĉino, Aleksandro Zilbernick, kiu estis bonhava entreprenisto kaj multe interesiĝis pri lia projekto. La patro kaj la filino konsentis dediĉi parton de ŝia doto al la eldono de la libreto.

En aŭgusto de la sama jaro li edziĝis je ties filino, Klara, kiu poste fidele helpis kaj subtenis lin en la disvastigo de la lingvo. Ili havis tri infanoj: Adamo, Sofia, kaj Lidja.

Baldaŭ poste la libreto aperis ankaŭ en la pola, la franca kaj la germana, kaj nur multe pli malfrue en la angla kaj aliaj lingvoj. Ĉi tiun broŝuron li dissendis al multaj influaj personoj, redakcioj de ĵurnaloj ktp. en diversaj landoj, kaj aperigis anoncojn en la gazetaro. Baldaŭ li ricevis multajn aprobajn reagojn de personoj, kiuj estis pretaj lerni la lingvon. Internacia revuo estis fondita. Iom post iom la peŭdonimo de D-ro Zamenhof, Esperanto, fariĝis la nomo de la lingvo mem.

En 1888 lia patro Marko troviĝis en granda embaraso. Akuzite, ke li permesis la publikigon de ofenda aludo al la caro en ĵurnalo, li perdis sian postenon de cenzuristo kaj ankaŭ timis perdi sian postenon de instruisto. Tial Ludoviko donacis 5.000 rublojn, la resto de la doto de sia edzino, al sia patro por subaĉeti la respondecan oficiston.

En oktobro 1888 li tamen sukcesis eldoni en alfabeto ordo la unuan *Adresaron*, kiu enhavis mil adresojn de esperantistoj. La plej granda nombro loĝis en la Rusa Imperio, sed ankaŭ en Anglio, Aŭstrio-Hungario, Francio, Germanio, Hispanio, Italio, Rumanio, Svedio kaj Turkio, Ameriko, Afriko, Azio kaj Oceanio.

En 1889 li petis en sia *Dua Libro* la esperantistojn proponi plibonigojn por sia lingvo. El ĉiuj proponoj li retenis nur unu: la tempadverbojn *ian, ĉian, kian, nenian, tian* li modofis en *iam, ĉiam, kiam, neniam, tiam*, por ne konfuzi ilin kun la akuzativo de la adjektivaj pronomoj. “Tiu ĉi libreto estas mia lasta vorto, kiun mi elparolas en la rolo de aŭtoro”, li skribis.

D-ro Zamenhof restis malriĉa sian tutan vivon. Dum kelkaj jaroj li devis preskaŭ tute forlasi la laboron por Esperanto. Li vane serĉis sufiĉan klientaron en diversaj rusaj urboj, sed fine, en 1889, li reiris kun Klara kaj la infanoj al Varsovio. Nur en 1903 li venkis siajn financajn problemojn.

En 1892 lia patrino Rozalia mortis, nur 52-jara. Il profunde sentis tiun perdon. Post tio lia patro, Marko, pro amsoifo, pli amike ekrilatis al sia filo, kiun li perfidis, sed kiu savis lin.


En 1905 li vizitis la unuan Universalan Kongreson de Esperanto en Bulonjo-êe-mar (Francio), kie li travivis veran triumfon. 688 esperantistoj el 12 landoj êeestis. Ilia entuziasmo estis ege granda. Ĝis nun la kontaktoj inter la esperantistoj estis êefe skriba. Sed dum la kongreso la plej multaj parolis Esperanton unuafoje, kaj ili konstatis kun ĝojo, ke la lingvo estas parolebla kaj ke ili komprenis sin reciproke. En ĝi partoprenis ankaŭ du junuloj el Ĝenevo. En 1906 ili organizis la duan UK-on en sia urbo. Poste ili estis ludontaj gravan rolon en la movado: Edmond Privat kaj Hector Hodler, kiuj havis tiam respektive nur 18 kaj 17 jarojn. Hodler fondis UEA, sed mortis tre juna. Privat sukcedis lin.

Ekde tiam lia vivo estis pli trankvila, sed lia koro neniam estis tre forta, kaj jam la 14-an de aprilo 1917 li mortis tute elĉerpita, dum la popoloj de Eŭropo kruele intermilitis. Poste la esperantistoj metis belan monumenton sur lian tombon sur la juda tombejo de Varsovio.



L.L.Zamenhof kiel juna gimnaziano (1873)
(staras maldekstre antaŭ la florzvo)

D-ro Zamenhof estis malgranda, bonkora viro kun modesta karaktero, sed kun klara menso kaj energia volo. La strukturo de lia lingvo montras veran geniecon. Laborante por la bono de la homaro, li faris als si malmultajn zorgojn pri monprofito. Amante la homojn, precipe la malriĉajn kaj suferantajn, li loĝis en la plej mizera kvartalo de Varsovio kaj ofte kuracis senpage homojn, kiuj ne povis pagi.



Li eĉ rezignis pri siaj rajtoj je la lingvo kaj donacis ĝin al la homaro. Tial li ankaŭ ne volis esti la ĉefo aŭ gvidanto de la Esperanto-movado kaj rifuzis la titolon majstron. Li volis ke lia lingvo libere evoluu per la uzado kaj konsideris sin mem nur kiel la inciatinton.

Dum la dua mondmilito la naziistoj bombardis la domon de Zamenhof kaj murdis sian tutan familion. Nur lia nepo, Ludoviko, kaj ties patrino Vanda, la edzino de lia plej aĝa filo Adamo, supervivis la holokaŭston, dum ili estis transportataj de la varsovia geto al ekstermejo.

(Laŭ "Zamenhof"
de Marjorie Boulton)

Novaĵoj el Esperantolando

(*Nieuws uit Esperantoland*)

Ukrainio: *Esperantokurso en universitato* –

Mi estas Svetlana Pogorelaja, esperantistino de la jaro 1973-a, vicdelegitino de UEA por Kievo, Ukrainio. Kun ĝojo mi informas vin, ke ĉi-jare en unu el la universitatoj de la urbo Kievo, la ĉefurbo de Ukrainio, estos instruata Esperanto kiel egalrajta studobjekto. La fakultaton gvidas mi.

La rektoro, kiu antaŭe preskaŭ nenion sciis pri la Internacia Lingvo, ŝatus ricevi pruvojn, ke la lingvo estas vaste uzata en la mondo. Tial ni estus dankemaj al vi, se vi bonvolus sendi elektronpoŝtan mallongan Esperantlingvan gratulleteron aŭ bildkarton kun bondeziroj. En via gratulletero bonvolu indiki ankaŭ viajn urbon kaj landon. La adreso estas: universitato3a@ukr.net; Svetlana Pogorelaja.

La universitato estas nova. Ĝi fariĝos unujara en la monato aŭgusto. La nomo de la universitato estas "Universitato de la Tria Aĝo". En la programo kaj la lernolibroj por la Esperanto-instruado, kiujn mi kreis, estas antaŭviditaj

multnombraj specialaj metodikaj ludoj, kantado, aktorado, vizitoj al muzeoj, teatroj, koncertoj, parkoj ktp.


2010.05.03 - Svetlana Pogorelaja

Francio: Franca tenisisto eliminata de ruso. –

Hieraŭ la franca tenisisto Tsonga estis eliminata de la tenisisto de Roland Garos fare de sia rusa kontraŭludanto. Tiu ĉi nomiĝas en la rusa lingvo Михаил Южный, nomo kiu povas esti transliterumita en Esperanto kiel 'Miĥaelo Juĵnij'. En la franca oni transskribas la nomon kiel 'Michel Youjn', ĉar 'y' la francoj prononcas kiel la esperantan 'j', 'ou' kiel la esperantan 'u', kaj 'j' kiel la esperantan 'ĵ'.

La angloj transprenis la francan transskribon, escepte de la "ĵ", kiun ili anstataŭigis per 'zh', ĉar la son 'ĵ' ne ekzistas en sia lingvo. Tiun literkombinon 'zh', kiu ankaŭ ne ekzistas en la angla, ili uzas nur en fremdaj nomoj. Ili skribis do 'Youzhny'. 2010.05.31- Alain Coulon


Ĉiuj lingvoj transliterumas, ekz. rusajn nomojn, laŭ sia propra ortografio. Ekzemple **Чехов** (Ĉeĥov) fariĝas **Tsjechov** en la nederlanda, **Tchekhov** en la franca, **Chekhov** en la angla, **Tschechow** en la germana, **Chejov** en la hispana, **Czechow** en la pola ktp. Bedaŭrinde multaj gazetoj en la mondo, blinde transprenas plej ofte la anglan transskribon, tiel ke neniu povas korekte legi tiajn nomojn ekster la angloj mem. Tamen ili ĉiuj havas la saman alfabeton! (N.d.l.r.)



Kelkaj belaj ekzotikaj alfabetoj !

Francio 1: Granda kresko de Vikipedio! -

Por Vikipedio kreskas la risiko perdi sian 22-an lokon profite al la dana versio. Plue reduktiĝas la diferenco de la nombro da artikoloj: Esperanto 129.952 - dana 129.686 = 266... Male fulmorapide progresas la aŭtomata esperantigo de la angla **Wikipedia**, kiu enhavis 559.573 artikoloj la 22-an de majo kaj 644.474 la 1-an de junio, t.e. pliaj 84.474.



La averaĝa kvanto de 8.384 artikoloj ĉiutage indikita en komuniko de la 26-a de majo ŝajnas ne tro fora de la realeco. Surbaze de 300 labortagoj jare, tio signifas, ke post unu jaro la nombro de 2.500.000 artikoloj en Esperanto estos atingita... do, multe pli ol la versioj aliaj ol la angla: germana: 1.075.146; franca: 954.029; pola: 704.198; itala: 693.244; japana: 679.924; nederlanda: 604.922!

2010.06.01 – Henri Masson

Francio 2: Nova utila Esperanto-retejo –

<http://esperanto-tra-la-mondo.net> estas nova retejo tute en Esperanto, kreita en Bretonio far teamo el Morlaix [morle'] kun la celo plifaciligi la serĉadon de retejoj pri la Lingvo Internacia. Esperantio estas do pli vasta ol oni supozus! Gratulojn al la iniciatintoj de la retejo kaj ankaŭ dankon al **Mike59**, kiu atentigis pri ĝi ĉe Ipernity. Se vi volas ekscii kiel uzi ĝin, iru al <http://www.esperanto-tra-la-mondo.net/letero-unu.html>. Rubrikoj kaj subrubrikoj ebligas pli rapide trovi tion, kion oni serĉas.

Evidente, ĝi ne estas kompleta kaj neniam estos tia, tial ke konstante evoluas kaj disvastiĝas la uzado de la lingvo. Sekve, la iniciatintoj esperas ricevi rimarkojn, atentigojn, korektojn kaj proponojn. Ili deklaras : "Tiu ĉi retejo estas pordo al kelkaj indaj retejoj kiuj rilatas al Esperante konstruitaj retejoj, kaj tute aparte al oficialaj kaj internaciaj asocioj, aŭdovidaj podkasto, blogaj retejoj, iloj, kursoj pri Esperanto, retaj gazetoj, librejoj, bibliotekoj, politiko, sindikatismo, lingvistiko, personaj, landaj kaj regionaj retejoj, religio, filozofio kaj muziko. Nia teamo celas forigi la paĝojn ERROR-404-NOT FOUND. Helpu nin!"

2010.06.01 – Henri Masson

Francio 3: Saint-Nazaire: Esperanta urbo –

Vendredon la 4-an de junio ni transdonos oficiale al la respondeculino de la turisma agentejo informiletojn en Esperanto pri Saint-Nazaire, nia urbo, kaj diplomon al nia urbestro... Ni atendas senpacience de vi amikan vorteton, eĉ se ĝi estas nur retmesaĝeto ...

Antaŭ kelkaj jaroj ni tradukis kelkajn informiletojn pri St-Nazaire kaj tre baldaŭ, oficiale, tiuj informiletoj troviĝos sur la bretoj de la turisma agentejo, kaj okaze de tiu evento ni festos nian tristelan diplomon kaj la naskiĝdatrevenon de nia loka, 25-jara asocio.

Ni ŝatus ricevi multajn poŝtkartojn por montri al nia urbestro, ke nia urbo estas konata en la tuta mondo danke al Esperanto. Jen la adreso de nia Esperantogrupo: Centre Culturel St-Nazaire, Esperanto, chez Patrick et Chantal BARRET, 38, rue de la Croix Fraîche, F-44600 Saint-Nazaire

2010.05.30 Patrick et Chantal Barret

Rusio: Nova diplomverko pri Esperanto –

La 31-an de majo 2010 en Jakatarinburgo la juna studentino Arina Osipova diplomiĝis pri la temo "Propedeŭtika rolo de Esperanto en la lernado de la germana lingvo". Ŝi studis en la Urala Ŝtata Pedagogia Universitato, instituto de fremdaj lingvoj.

Jam profesia instruistino de la germana, Arina lernis Esperanton antaŭ kvar jaroj. Ŝi multe interesiĝas ĝuste pri propedeŭtiko, tial ŝi komence volis pristudi nur ĝin – kiel Esperanto ĝenerale helpas lerni lingvojn. Sed la dekanino de ŝia fakultao estis forte kontraŭ Esperanto.



Tial baza problemo estis trovi sciencan gvidanton por la diplomverko, ĉar neniu el la pedagogoj vidis la sencon okupiĝi pri tio. Ili cetere opiniis, ke la propedeŭtika valoro de la latina sufiĉis. Arina tamen ricevis kiel gvidantinon instruistinon de la franca, kiu iam lernis Esperanto. Tial Arina devis fakte labori memstare. Ŝi laboris dum du jaroj, analizis la Esperanto-rusan vortaron de A. Ŝevĉenko, kaj

krome uzis etimologian vortaron de Esperanto. Ŝi ankaŭ faris jenan eksperimenton: ŝi proponis al 22 esperantistoj kun malsama Esperanto-lingvo-kono kaj nenia kono de la germana, traduki el la germana apartajn vortojn, apartajn frazojn kaj mallongan tekston. Por tiu traduko ili ricevis 45 minutojn. La rezultoj estis tiel pozitivaj, ke la hipotezo pri la propedeŭtika valoro de Esperanto estis plene konfirmita.

2010.06.03 – G. Arosev



Kirgizio: Rasisma hombuĉado en Kirgizio –

Kirgizio, lando en centra Azio, estas nuntempe la scenejo de hororaĵoj. En 1990, ĝuste antaŭ la disfalo de Sovetunio, ribeloj okazigis plurajn centojn da hommortoj en la kirgiza urbo Oŝ. Nun amasinformiloj raportas plimalpli detale pri multe pli grava intertna konflikto denove okazanta ĉefe en la suda parto de Kirgizio: almenaŭ 1000 mortintoj, pli ol 2000 vunditoj, pluraj centoj da detruitaj domoj, 275.000 fuĝantoj en la konfliktzono ĉe la uzbeka landlimo. La viktimoj estas ĉefe uzbekoj, kontraŭ kiuj okazis pogromoj. La unuaj interbatiĝoj okazis inter junaj kirgizoj kaj uzbekoj sekve de disvastigita onidiro, laŭ kiu kirgiza virino estis sekse perfortita fare de uzbekoj. La konflikto pligraviĝis kaj disvastiĝis. Laŭ diversaj informoj ankaŭ taĝikoj partoprenis en tiuj abomenindaĵoj.

Laŭ Asel Doolotkeldieva, esploristino en la centro de studoj kaj esplorado de la Lernejo de Politikaj Sciencoj en Parizo, la kaŭzo devas estas atribuita al filo de la forpelita diktatora prezidanto Kurmanbek Bakiev kaj aliaj familianoj, helpataj de mafiaj retoj. La tuta lando suferas pro koruptado, drogonegoco kaj krimaj organizaĵoj.

Evidentiĝas, ke malgranda influa grupo kreis tiun situacion por tiri profiton el ĝi.

2010.06.16 – Dimitrio Doĉenko.

Dum la referendumo, organizita la 27-an de junio 2010 90% de la kirgizoj aprobis la novan konstitucion, kiu donas pli da povo al la parlamento, limigante la povon de la prezidanto. Tiel Kirgizio fariĝis la unua parlamenta demokratio en centra Azio. (N.d.l.r.)

Danio: *Liberaj lokoj en Eo-laborbrigado –*

Pro lastmomenta rezigno de iuj partoprenantoj en la Esperanto-laborbrigado dum la rokfestivalo en Roskilde apud Kopenhago loko fariĝis disponebla por pliaj 22 personoj. La aranĝo komenciĝos la 26-an de junio. La organizantoj de la festivalo, la Dana Esperanto Junulara Organizo, invitis 100 esperantistojn. La restado kaj bileto por la granda muzikfestivalo estas senpagaj.

La laborbrigado estas rekomendata precipe al gejunuloj: loĝado en tendoj, purigaj laboroj ktp., sed ankaŭ restado inter esperantistoj, komuna muzikumado kaj multaj festivalaj koncertoj, i.a. tiuj de mondfamaj muzikgrupoj.

En 2009 la partoprenantoj ĉeestis koncertojn de i.a. Pet Shop Boys kaj Cold Play. En 2010 koncertos multaj grupoj. La listo aperas ĉe: <http://roskilde-festival.dk/index.php?id=326>, retadreso: roskildefestivalo@gmail.com.

2010.06.20 – Maria Majerczak

Eurovision: karikaturo de Eŭropo *(Eurovision: karikatuur van Europa)*

La Eŭropa Unio havas 23 oficialajn lingvojn, inter kiuj unu estas pli “oficiala” ol la ceteraj, pli kaj pli ofte la unika. Ĝia devizo estas tamen “Unueco en diverseco”. Pli konforma al la realeco estus “Unueco en hipokriteco”, ĉar tiun onidiran “diversecon” ni spertas kaj konstatas ĉiutage ĉe la eŭrop-uniaj instancoj: temas pri evoluo al unulingveco, al nurangla-lingveco, al superrego de unu nacia lingvo super ĉiuj ceteraj.

Sendepende de la eŭropaj institucioj tiu “diverseco” estas konstatebla kaj kontestenda ankaŭ en la kantokonkurso “Eurovision”, por kiu la nomo “Anglovision” pli kongruus kun la realeco. Forestas originaleco kaj aŭtentikeco. Ĝi similas al la menudiverseco kaj dietika diverseco de la usona manĝmaniero, per kiu danĝera kaj eĉ mortiga trodikiĝo forte trafas Usonon.

Tamen estas io ĝusta en *Eurovision 2010*: nur la titolo de la kanzono per kiu la juna germana

kantistino Lena Meyer gajnis tiun konkurson: *Satellite*... Efektive la Eŭropa Unio fariĝis satelito de Usono kaj de ties eŭropa partnero en la sateligo de la ceteraj eŭropaj landoj. Pli kaj pli kreskas la prefero de denaskaj parolantoj de la angla en anoncoj super homoj eĉ profesie spertaj kaj valoregaj, por kiuj ĝi estas la unue lernita fremda lingvo. Unu ekzemplo: <http://www.aladom.fr/cours-anglais/paris-75/baby-speaking-jobs-for-native-english-speakers-m34>. Tion pagas la impostpagantoj, di ankaŭ vi...



Tom Dice, la partoprenanto de Belgio, ricevis la sesan lokon kun sia *Me and my guitar*...

Pli aktualaj ol iam ajn estas la libroj de profesoro Robert Phillipson: “**Linguistic Imperialism Continued**” (Lingva imperiismo daŭrigata) kaj “**English only Europe: “Challenging Language Policy**” (Ĉu nurangla Eŭropo? – Defio al la lingva politiko), aperinta en Esperanto-traduko); de la angla historiistino kaj ĵurnalistino Frances Stonor Saunders: “**Who paid the Piper? CIA and the Cultural Cold War**” (Kiu pagas la sakflutiston? CIA kaj la Kultura Malvarma Milito); aŭ de Charles Xavier Durand: “**Une colonie ordinaire du XX-ième siècle**” (Ordinara kolonio en la 20-a jarcento).

Ni neniam forgesu la vortojn de Margaret Thatcher (2000): “*In this twenty-first century the dominant power is America, the global language is English and the pervasive economic model is Anglo-Saxon capitalism*” (En tiu ĉi 20-a jarcento la superreganta povo estas Usono, la superreganta lingvo estas la angla kaj la superreganta ekonomia modelo estas la uson-angla kapitalismo).

Nek la vortojn de David Rothkopf (1997): “*It is in the economic and political interests of the United States to ensure that, if the world is moving toward a common language, it be*

English; that if the world is moving toward common telecommunications, safety and quality standards, they be American; that if the world is becoming linked by television, radio and music, the programming be American; and that if common values are being developed, they be values with which Americans are comfortable” (Estas en la ekonomia kaj politika interesoj de Usono zorgi, ke, se la mondo adoptas komunan lingvo, ĝi estu la angla; ke, se ĝi orientiĝas al komunaj normoj pri telekomunikado, tiuj normoj estu usonaj; ke, se la mondopartoj estas kunligitaj per televido, radio kaj muziko, la programoj estu usonaj; kaj ke, se komunaj valoroj estas disvolvigitaj, ili estu valoroj en kiuj la usonanoj sentas sin komfortaj).

Rekviemo por lingvo *(Requiem voor een taal)*

La pasintan monaton la gazetoj tutmonde dediĉis artikolon al ŝi, sed ŝi ne plu legos ĝin, ĉar tio okazis post ŝia forpaso la 4-an de februaro de tiu ĉi jaro. Verŝajne ŝi neniam legis gazetojn. En ŝia lingvo certe neniam aperis gazetojn.



Patrino Bo, la lasta bo-parolanto

Kio do estis tiel speciale pri patrino Bo? Kun ŝi mortis lingvo. Patrino Bo nome estis la lasta, la tute lasta, kies gepatra lingvo estis la aka-boa. Lingvistoj surdiskigis kanzonon kiun patrino Bo kantis por ili. “La tero tremas,” kantas patrino Bo sur tiu disketo, “kiam arboj renversiĝas kun obtuza pumo.” Tio bedaŭrinde ne okazas por lingvoj.

Tamen organizaĵo, kiu defendas la rajton de la minacataj popoloj, sonorigis la alarmsonorilon. Ironie tion faris *Survival International* (Supervivado Internacia) en la angla. Se malaperas lingvoj, pro tio ŝuldas ankaŭ la superrega kaj trudiĝema pozicio, kiun tiu ĉi lingvo arogas al si.

En Flandrio oni jam plurfoje rimarkigis, ke ankaŭ la nederlanda lingvo en Flandrio iom



post iom fariĝas minacata lingvo. La kreskant-manion paroli ian karboanglan, precipe en la mondo de la interkomunikado, la nederlanda en Flandrio ja supervivos. La fakto, ke la standarda nederlando lingvo pli kaj pli estas forpuŝata de ia miksaĵo de dialekto kaj la nederlanda, estas pli grava minaco. Certe kiam nun ankaŭ flandraj geaktoroj, gekantistoj kaj ĉiuj kiuj okupiĝas pri la ‘vorto’, uzas tiun ĉi lingvaĉon.

Patrino Bo restis fidela al sia gepatra lingvo. Ĝis sia lasta tago ŝi vivis sur Adamanoj, bela insularo en la Bengala Golfo. Tiu insularo apartenas al Hindio, sed, situante je 1200 km de la hinda orienta marbordo, ĝi fakte ne rilatas al tiu lando.

La homoj kiuj ankoraŭ loĝas sur la insularo, setlis tie, veninte el Afriko, verŝajne antaŭ ĉirkaŭ 65.000 jaroj. La booj, kaj la manpleno da homoj de aliaj parencaj triboj en tiu regiono, apartenas al la plej maljunaj kulturpopoloj en la mondo. Ili apartenas al dek triboj, parolas naŭ diversajn lingvojn kaj estas sume ankoraŭ 52 personoj... En tiu angulo de la mondo estas do mortantaj ankoraŭ pli da lingvoj.

La plej grandan ŝancon supervivi havas la jaravaoj. Tio estas tribo kiu vivas tute izolita kaj kiu je la dua kristnaskotago de 2004 liveris tutmondan novaĵon pafante per arkoj kaj sagoj al la helikopteroj kiu alportis helpon post la terura cunamo. Tiam patrino Bo savis sian vivon grimpante sur arbon...

La britoj okupaciis Adamanojn en 1858 kaj alikonstruis ilin en unu el siaj plej fifamaj punlaborejoj. Tiam estis ankoraŭ ĉirkaŭ 5.000 booj. La britoj tieldire provis civilizi la prenenloĝantojn, kun la rezulto, ke post duona jarcento, ili estis nur 48. Ili estis transloĝigitaj en adamanan hejmon, fakte koncentrejon. De la 15 infanoj kiuj naskiĝis tie, neniu vivis pli ol du jarojn.

Kaj nun, kiam la lasta boo mortis, *Survival International* sonorigas la alarmsonorilon.

Abunde malfrue!

Jan Veestraeten

Greko vendas insulojn (*Griekenland verkoopt eilanden*)

Kiam germana politikisto faris la proponon, la tuta Grekio koleriĝis. Sed nun la greka registaro mem proponas vendi aŭ luigi grekajn insulojn aŭ partojn de ili por tiel plimalgrandigi la ekscesan ŝuldoŝarĝon de la lando.



Ĉu vi ŝatus aĉeti la insulon Santorino?

La greka registaro proponas por aĉeto terenon sur la populara turisma insulo Mikono (Mykonos). Oni serĉas aĉetonton kiu pretas evoluigi la turisman infrastrukturon – Ateno pensis ĉe tio pri luksa hotelo. Ankaŭ sur la insulo Rodo (Rhodos) oni laŭdire avida atendas riĉajn investontojn, kiuj pretas pagi multan monon por aĉeti terenojn aŭ lupreni ilin.

La brita gazeto *The Guardian* menciis ankaŭ, ke la greka registaro intencas vendi nekonatan nombron da neenloĝatajn insuletojn. Da tiuj troviĝas ĉirkaŭ 600 en la Egea Maro.

Multaj kandidatoj-aĉetontoj estas ĉinaj milionuloj. Ankaŭ la rusoj ŝatas Grekion. Miliardulo Roman Abramoviĉ (proprietulo de la angla futbalklubo Chelsea) interesiĝas, laŭ la brita gazeto, pri la projekto sur Mikono.

Per tiu nemoveblaĵa komerco Ateno volas parte ŝtopi la truon en sia ŝtatbuĝeto. En majo Grekio ricevis urĝan prunton de 110 miliardoj da eŭroj de la eŭrolandoj kaj de la Internacia Monfonduso. Antaŭ nelonge la greka registaro decidis draste reformi la pensi-sistemon. La averaĝa pensio sumas je 720 eŭroj. La reformo plialtigas la pensi-aĝon de la virino de 60 al 65 jaroj.
(H.B.V.L.)

Kio ekzakte estas kodumulo? (*Wat is precies een hacker?*)

La bildo de kodumulo multe ŝanĝiĝis tra la jaroj. Hodiaŭ li estas precipe socie negativa persono (kodrompisto). Antaŭ multaj jaroj tio ne estis la kazo, kaj ankaŭ hodiaŭ tio ne ĉiam estas vera.

Kodumulo estas persono kiu interesiĝas pri la sekureco de komputilsistemo, aŭ iu kiu serĉas truojn en la sekureco de sistemo kaj ankaŭ utiligas ilin. La diferenco troviĝas en la celo de la kodumulo: iu povas penetri en sistemon por tie kaŭzi kiom eble da damaĝo, sed iu alia povas pristudi iun sistemon kaj sciigi la truojn al la sistem-administranto.

Estas do diversaj specoj de kodumuloj.

White Hats (blankĉapeluloj) pristudas programaron aŭ lokan reton por komuniki ĝiajn mankojn al la koncerna instanco. Tiuj personoj ofte rompas kodojn nur ĉar ili serĉas defion.

Estas ankaŭ la tiel nomataj *Grey hats* (grizĉapeluloj). Tiuj estas kodrompisto kiuj volas profiti ambaŭflanke. Unuflanke ili zorgas, ke iuj truoj en programaro aŭ loka reto estu ŝtopitaj, sed aliflanke, ili certe ankaŭ ekspluatos la situacion, konatigante tion al la publiko kaj priskribante la manieron kiel oni povas penetri en la sistemon.

La tiel nomataj *Black Hats* (nigraĉapeluloj) rompas kodojn nur por si mem. La fakto, ke lia vizito fuŝas tutan sistemon estas tute egala al ili. Ili ekzemple ŝtelas ĉiajn datumojn por plibonigi sian propran fiancan situacion.



Sed povas esti ankoraŭ pli malbone. La lastan grupon ni nomas la *Script Kiddies* (scriptjunuloj). Tiuj ofte estas junuloj, kiuj uzas programetojn por eniri sistemon kaj nomas tion kodumi. Tiu grupo plej suferigas nin, la ordinarajn komputilistojn, ĉar ili jes uzas programeton, sed havas nenian ideon kiel la programeto funkcias aŭ kion ili estas farantaj. Ili penetras en ies sistemon nur por amuziĝi, kaj la damaĝo farita al tia sistemo ofte estas grava, ĉar la junuloj arbitre forigas aĉetajn aŭ pasvortojn, tiel ke kliento (account) ofte ne plu povas esti uzata.

Kial ni, kiel hejm-uzantoj, ne devas timi la verajn kodrompistojn? La kaŭzo pro tio estas tre simpla: por ili tio estas ofte tro simpla kaj sur la komputiloj de hejm-uzantoj ili trovas nenion interesan.

Poezio: La vivo de Prometeo (fino)

(Poëzie: *Het leven van Prometheus (slot)*)

La knabino Ija trovas fremdan vunditan viron en arbaro. Ŝi flegas, nutras kaj trinkigas lin. Ili enamiĝas. La fremdulo mortigas kapreolon.

Tiam li per simpla mov'
kun tremet' pro freŝa blov'
sur la ŝultrojn levas predon,
sed vunditan la piedon
elprovinde, kun grimac'
ŝian ŝultron kun tenac'
li ekkaptas, kaj ordonas...
Kion? Ŝia koro donas
la klarigon pri l'ordon'
malgraŭ nekutima son'.
Ija longe ne revenas,
maltrankvil' la genton prenas,
la patrino serĉas ŝin:
kie estas la filin'?'
Serĉas ŝin samgentaninoj,
la alarmo – en kulmino.
Ĝuste tiam el arbar'
jen aperas stranga par'
de natendata flanko.
Ija – sur vizaĝo – blanko;
kun timego kaj esper'
ŝi rigardas al la ter'.



Apud ŝi – fremdul' Lo-genta,
iras kun mien' atenta,
sur la ŝultroj – la cervet',
unu lamas la pied'.
Kaj rigardas ilin gent'
ŝtoniĝinte en silent'.
Fremdan viron al la fajro
alkonduki? Nu, kanajlo!

Estas ŝtonoj sur la ter':
ne tro daŭros la afer'.
Sed ŝi estas ja filino
de l' vorist': inklino
lia klaras. Lia vort'
estas viv' por ŝi aŭ mort'.
Tamen portas li viandon!
Kiun donas Ra' komandon?
Ro' de l' loko kun rikan'
levas sin kun ŝton' en man'.
Rao diris al li: "Sidu!
Pri la agoj ne rapidu!
Por komenci, la demand':
Ĉu ne vidas vi: viand'!"
"Nu, la lastan ni formanĝos,
al fremdul' la kolon tranĉos,
kaj ĉi tiu peka in'
estu mia, kaj la fin'!"
"Rememoru kiam do
portis cervon, vi, hero'?"
Ili ambaŭ kulpas, aŭ
ambaŭ rajtas je la sav'".
Sed la paro jam apudas.
La fremdulo same mutas,
kaj de Rao al pied'
estas tuj ĵetita l' pred'
Ĝusta estis sent' komuna:
sen erar', Lo-ano juna!
Ija rakontis, ke ŝi trovis en la arbaro la vunditan viron, kiu mortigis la kapreolon kaj alportis ĝin laŭ ŝia invito.
"Kiun rajton do vi havis
al la gent' fremdulon voki?"
Ro' en la indigno pravis:
la afero povis ŝoki.
"Kulpas mi. Sed la viando..."
Ĉiuj mutis. Jen demando!
Kelkajn tagojn antaŭ l' brulo
vidis mi per la okuloj
propraj – ankaŭ vi, Aba' –
grupon de Lo-anoj ja;
ĉu silikon serĉi venis,
ĉu ĉaslokon – ne komprenis
tiam ni. Jen la rezult':
eble estis timtumult'
aŭ malpacon iu semis,
pro kverelo aŭ insult,
sed li estas jen vundita,
de l' gentanoj perfidita.
Se ni nun mortigus lin,
ĉu utilis tio nin?
Li ĉasisto estas lerta,
En la ŝtonlaboro sperta.
Eble Ija ne pro stult'
tion faris." "La adult'!"

kriis Ro' indignatone.
 "Ĉu vi scias tion bone?"
 tuj respondis la vorist'.
 "Lamas li ja!" kun persist'
 daŭre kriis Ro' senlace.
 "Resaniĝos," diris pace
 Rao. "Baldaŭ eta spur'
 pri la vund' atestos nur.
 Viroj niaj ja malmultas..."
 Ĉiuj sidas kaj aŭskultas
 kaj respondas per hura':
 "Certe pravas nia Ra'!
 Predon rostu laŭ la rito,
 grandas nia apetito!"
 "Ni akceptu l' novan anon,
 kaj ni havos lertan manon!"
 Kiam la rostaĵo pretis,
 Rao la porciojn metis.
 La plej grandan donis do
 li al nova ano Lo;
 tiel ĉiuj lin eknomis.
 Manĝon ege li bezonis...

Boriso Tornado

"Van de Vos Reynaerde"

La fama flandra mezepoka bestepopeo, verkita ĉirkaŭ 1250 de nekonata poeto kaj ekde tiam tradukita en multajn aliajn lingvojn, nun haveblas ankaŭ en Esperanto.

La poemo enhavas 4250 senrimajn versojn kaj legiĝas kiel prozo. Ĝuu ankaŭ vi la spitajn aventurojn de la ruza besto.

Mendu ĝin ĉe UEA, Nieuwe Binnenweg 176, NL-3015 BJ Rotterdam,

aŭ ĉe la tradukinto: Pieter Jan Doumen, Peerderbaan 81, B-3940 Hechtel-Eksel,:

pieter-jan.doumen@telenet.be

Prezo: € 15 + sendokostoj



Ni, la estraro de la Limburga Esperanto-Asocio deziras al ĉiuj niaj legantoj agrablajn kaj malstreĉajn somerferiojn!

La Limburga Esperanto-Asocio (De Limburgse Esperantovereniging)

Aktivaĵoj en majo kaj junio 2010:

Ĵaŭdon, la 27-an de majo

Ĝenerala kunveno de LEA

Ĉeestis nur kvin personoj: Jan Doumen, Paul Hotterbeekx, Rik Leijskens, An Olij-slayers kaj Henri Schutters. La prezidanto,

Henri Schutters, komunikas, ke Harry Schoofs ekskuzigas sin kaj demisias kiel estrarano, ke 16 Limburgaj esperantistoj pagis sian membrokotizon al FEL por 2010, kaj ke li demisias kiel prezidanto.

Jan Doumen transprenas lian taskon, dum Henri Schutters konsentas fariĝi sekretario kaj prizorgi la kontaktojn kun la estraro de la urbo Peer.

La nova prezidanto dankas Henri pro sia multjara aktivado por Esperanto. Li konstatas kun bedaŭro, ke ŝajne malmultaj

Limburgaj esperantistoj ankoraŭ interesiĝas pri nia afero, ĉar la nombro de la membroj malpliiĝas ĉiujare.

Laŭ li pro tio ĉefe respondecas la manko de homa kontakto. Li promesas entrepreni ion por plimultigi la membraron kaj ankaŭ por propagandi Esperanton.

Ĵaŭdon, la 24-an de junio

Je la 8-a vespere kvin esperantistoj (la kutimaj aktivuloj) minus Rik Leijskens, kiu ekskuzis sin, kolektiĝis apud la globulluda tereno en la ĝardeno malantaŭ la domo de Jan Doumen. La vetero estis belega por tiu ludo kaj la etoso en la grupo bonega. Ĉar ne eblis ludi en teamoj pro la nepara nombro, oni ludis individue, ĉiu per tri globoj. Preskaŭ ĉiuj ludis 'petankon' unufoje, sed la fervoro ne estis malpli granda pro tio. Dum la paŭzo oni trinkis refreŝigaĵon, laŭvole bieron, limonadon aŭ akvon. Je la 10-a oni finis la ludon, kvankam la matĉo ankaŭ ne estis fininta. Ne gravas la finaj rezultoj, ĉar ni trovis, ke estas pli grave partopreni, ol gajni. Kiel ĉiam la forestintoj malpravas!

Kie iam situas Trojo (1)


(Waar eens Troje lag... (1))

Tiu ĉi titolo estas parto de verso de la latina poeto Ovidio Nazono. La tuta verso tekstas jene: “Kie iam situas Trojo, nun kreskas greno”. La enhavo de tiu ĉi verso estas stranga, ĉar sur la monteto Hisarliko en Turkio, kie oni tradicie situas Trojon, neniam kreskis greno! Kial do la poeto skribis tian sensencaĵon?

Temas pri la Trojo de Homero, la fama malnovgreka poeto, kiu priskribis la militon de Trojo en du longaj epopeoj, la Ileado kaj la Odiseado. Laŭtradicie Homero naskiĝis ĉirkaŭ 800 a.K. Tio estas 400 jaroj post la troja milito, kiun oni situas inter 1894 kaj 1884 a. K. Tial oni pensas, ke ambaŭ poemoj estis buŝe transdonataj dum kvar jarcentoj antaŭ ol esti skribitaj.

La epopeoj rakontas, kiel la aĥajoj konkeris kaj detruis Trojon kaj la longajn vagadojn sur la maroj de Odiseo (Odysseus), kiu konstruis la ĉevalon de Trojo kaj tiel kaŭzis la falon de la urbo. La greka dio Posejdon, kiu konstruis la muregojn de la urbo, punis lin per tiuj vagadoj.

La nomo ‘Iliado’ deriviĝas de ‘Ilion’, alia nomo por Trojo, kiun fondis Tros kaj lia filo Ilos, kvar jarcentojn pli frue.



Ĉu la muregoj de la Homera Trojo?

Krom Homero du aliaj verkistoj priskribis tiun militon, nome Dares la Frigo, kiu faris tion el la vidpunkto de la trojanoj, kaj Dictys la Kretano, kiu batalis je la flanko de la aĥajoj.

Ankaŭ la dramaturgoj Eŝilo (Ajsĥylos), Sofoklo (Sofoklès) kaj Eŭripido (Euripidès) elektis episodon de tiu milito kiel temon por kelkaj el siaj dramoj, kio pravas, ke la historio de la troja milito estis ĝenerale konata de ĉiuj Grekoj.

Ili ĉiuj liveris interesajn, kompletigajn detalojn, kiujn oni ne trovas ĉe Homero.

Kio do okazis?

Pariso, filo de reĝo Priamo de Trojo, vizitis Menelaon, reĝon de Sparta, kaj kidnapis ties belan edzinon Helena. Menelao kaj Agamemnono, reĝo de Miceno (Mykènaj) kaj ĉefreĝo de la aĥajoj, decidis militi kontraŭ Trojo kaj revenigi Helenan al Sparta. Dum la dekjara preparado ili kunigis ŝiparon de 1166 ŝipoj kaj armeon de ĉirkaŭ 100.000 viroj!

Post dekjara vana batalado, precipe post la morto de la fama heroo Aĥilo (Aĥileus), la aĥajoj malkuraĝiĝis kaj volis reiri hejmen. Tiam Odiseo konstruis enorman lignan ĉevalon, en kies ventro li kaŝis sin kun deko de viroj. La aĥajoj rulis la ĉevalon ĝis antaŭ la ĉefa pordego de Trojo kaj ŝajnis forveli.

Kredante, ke la aĥajoj vere reiris hejmen, la trojanoj trenis le ĉevalon en la urbon, festadis, dancadis kaj trinkadis ĝis mafrue en la nokto.

Tuj kiam ĉiuj trojanoj dormis, Odiseo kaj liaj viroj forlasis la ventron de la ĉevalo, malfermis la pordegon de la urbo kaj enlasis la aĥajojn, kiuj intertempe estis revenintaj.

Preskaŭ ĉiuj trojanoj estas mortigitaj kaj ĉiuj virinoj kaj infanoj kaptitaj kiel militpredo. La urbo estas bruligita kaj tute detruita.

Inter la malmultaj eskapintoj troviĝas Eneo (Ajneas), princo de Trojo, kiu poste setlis kun siaj kompanoj en Italio kaj laŭtradicie fariĝis la prapatro de la romanoj.

La troja milito okazis ĉirkaŭ 1200 a.K. dum la Bronza Epoko, kaj 200 jaroj antaŭ ol la doroj, jonoj kaj eoloj invadis kaj konkeris Grekion, la insulojn de la Egea Maro kaj la okcidentan marbordon de Malgranda Azio. Ili transprenis la lingvon kaj la kulturon de la tiea popolo, la pelasgoj, kiuj havis pli altan kulturan nivelon. Ili tamen influis la lingvon, en kiu oni trovas vortojn de ĝermana origino!

Sed oni ne scias de kie ili venis.

Ĉu la troja milito vere okazis?

Ĉiuj sciencistoj estas konvinkitaj, ke jes. Unuflanke pluraj verkistoj rakontas la militon de diversaj flankoj, kaj aliflanke Homero mencias tiom de nomoj de personoj kaj de popoloj kaj tiom da nombrojn kaj detalajn priskribojn, ke oni havas la impreson, ke li estis okulatestanto de la milito. Pristudinte la lingvon kaj stilon de la du poemoj, kiuj, ankoraŭ nun, estas konsiderataj kiel majstroverkoj, la sciencistoj opinias, ke ili estas verkitaj de unu sola poeto.

La fakto, ke la poemoj de Homero venis al ni en la malnovgreka, ne pravas ke tiu lingvo estas la origina lingvo de la poemoj.

Sed kiuj estis la aĥajoj?

Tradicie, sed malĝuste, oni tradukas tiun nomon per ‘grekoj’, kvankam en la tempo de la troja milito la greka popolo ankoraŭ ne ekzistis.

Homero eksplicite diras, ke trojanoj kaj aĥajoj adoris la samajn gediojn kaj parolis la saman lingvon. Nur unu tribo, aliancano de Trojo, parolis alian lingvon. Tial ili estis komandata de sia propra reĝo.

Se do aĥajoj estus la nomo de popolo, ankaŭ la trojanoj apartenus al ĝi. ‘Aĥajoj’ do ne povas esti nomo de popolo. En la kelta kaj la araba la vorto signifas ‘fratoj’ aŭ ‘aliancanoj’. Homero efektive nomas 29 popolojn aŭ pli ĝuste tribojn, kiuj formis la aĥajan aliancon.

Trojo siaflanke estis la ĉefurbo de lando, kiu nomiĝis Troado, kaj ĉiuj popoloj aŭ triboj de tiu lando batalis je ĝia flanko. Homero nomas 17 da ili.

Sed ĉiuj sciencistoj miras pri tio, ke la pri-skriboj de la lokoj fare de Homero tute ne akordas kun la nuna realeco. Ili serioze demandas sin, ĉu Homero ne nur estis blinda, sed ankaŭ freneza.

Ĉe Homero Itako, la lando de Odiseo, ne estas roka insulo kiel nun, sed troviĝas sur la kontinento.

Kiam Menelao finfine reiras hejmen kun Helena, li preterire vizitas la tombon de sia frato Agamemnono, kiu troviĝis en... Egiptio, almenaŭ laŭ la tradukistoj, ĉar laŭ Homero Egiptio ne estas lando, sed rivero! Post kiam Klitemnestro, helpate de sia amanto, murdis sian edzon ĉe lia hejmeveno en Grekio, ili enterigis lin en malproksima fremda lando! La faraono de Egiptio certe neniam estus permesinta tion. Cetere la grekoj donis al tiu lando la nomon Egiptio, kiu en la lingvo de la egiptoj nomiĝis Ta Kem (nigra tero). Alia antikva greka nomo por Egiptio estas Aeria, kiu signifas ‘la nebuloza’, kvankam nebuloj estas ekstreme maloftaj en Egiptio. La greko Hesiĥio (Hēsychios) nomis la landon ankaŭ Araŭklis, ‘sombra ĉielo’. Certe ne temas pri la Egiptio de Homero!

De la pli ol 500 loknomoj ĉe Homero oni retrovas nur 300 en Grekio kaj ĝia ĉirkaŭaĵo. Kie do troviĝas la 200 aliaj?

La klarigo de tiu enigmo estas simpla: kiel la homoj kiuj enmigris en Amerikon, ankaŭ la doroj, jonoj kaj eoloj kunportis la nomojn de siaj urboj, landoj kaj insuloj al sia nova patrio kaj donis ilin al la lokoj, kie ili setlis.

Tre verŝajne la enmigrantoj kunportis ankaŭ ambaŭ poemojn de Homero, kiun ili transdonis

buŝe de generacio al generacio, ĝis kiam ili estis skribitaj en unu de la tri grekaj dialektoj, la jona. Tiu kutimo buŝe transdoni sian historion ekzistis antaŭe en Gaŭlio kaj ankoraŭ nun ekzistas en Afriko kaj Mongolio.

Se tiel granda kaj longa milito okazis en la nuna Turkio, kiu tiutempe apartenis al la regno de la hetitoj, kial oni trovas nenian spuron pri ĝi en iliaj vastaj arĥivoj? Ili jes detale priskribas la faman batalon, kiun ili liveris apud Kadeŝo kontraŭ la egipta faraono Ramses II. Ĉu la hetitoj estus permesintaj, ke la aĥajoj militu dum dek jaroj sur ilia teritorio sen ke ili interveni? Tio ne estas kredeble.

La angla arĥitekto Michel Ventris deĉifris hetitajn tekstojn en kojnfirma skribo. Tiuj tekstoj mencias du influferojn de la hetitoj: Wilusa kaj Taruisa, kiujn iuj interpretis kiel Ilion kaj Trojon. Plue oni interpretas Ahhiayawa kiel aĥajojn, Atana kiel Atenon, Diwe kiel Zeŭson kaj Diwonusojo kiel Dionision. Iu Aleksandus estus la reĝo de Wilusa en 1280, sed ne povas temi pri Pariso, kiu nomiĝis ankaŭ Aleksandro, sed kiu vivis jarcenton poste kaj neniam estis reĝo.

Ne ekzistas interkonsento pri la interpreto de tiuj nomoj, sed oni povas supozi, ke la plej multaj estas korektaj. Tamen, arĥeologiaj trovaĵoj pravas, ke la fifamaj marpopoloj alvenis en Mediteraneo jam meze de la Bronza Epoko ĉirkaŭ 1600 a.K. kaj neniigis ankaŭ la regnon de la hetitoj, kiuj malaperis el la historio.

Oni ankaŭ tro facile preteratentas la fakton, ke, laŭ Homero, trojanoj kaj aĥajoj parolis la saman lingvon. Sed la lingvo de la tiutempa okcidenta Turkio estis la liŭa, hetita dialekto, kiel aperas el freŝdataj sciencaj esploroj.

La kredo, ke la Trojo de Homero situis sur la monteto Hisarliko en Turkio verŝajne baziĝas sur miskompreno, kiu jam ekzistis en la VIII-a jarcento a.K. Dum mallonga tempo tie efektive loĝis dardanoj, alia nomo por trojanoj, konservita en Dardaneloj, kiuj supervivis la militon kaj nomis sian novan urbon Trojo. Ili do venis el alia regiono kaj serĉis tie rifuĝejon. Post tri generacioj ili reiris al sia lando de origino.

Kelkajn jarcentojn poste, en ĉirkaŭ 800 a.K., ĉi tie instalas sin eoloj, kiuj konstruis tie urbon, kiun ili nomis Trojo aŭ Iliono, memore al la Trojo de Homero. Ili do konis la dramecan historion de la milito de Trojo kaj admiris la faman urbon kaj ĝiajn enloĝantojn! Tiu urbo estis enloĝata ĝis la kvina jarcento de nia erao.

(Daŭrigota)